

Statuto

kaj

Interna Regularo

de

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj



Versio en PDF de la Statuto kaj Interna Regularo de ILEI
kun hipersaltaj enhavtabelo kaj indekso. Serch-funkcioj
plie povas helpi trovi difinitajn temojn.

Kompilis:
Stefan MacGill
Budapest
Novembro, 2003

Enhavtabelo

Klaku pagh-numeron por salti al la koncerna artikolo.

STATUTO	4
Artikolo 1: IDENTECO	4
Artikolo 2: DIFINOJ	4
Artikolo 3: CELOJ	5
Artikolo 4: TASKOJ POR ATINGI LA CELOJN	5
Artikolo 5: MEMBRECO	6
Artikolo 6: FINANCAJ RIMEDOJ	6
Artikolo 7: ORGANIZA STRUKTURO	6
La Komitato	7
La Estraro	8
Sekcioj kaj Rerezentantoj	8
Artikolo 8: LA ADMINISTRA JARO	9
Artikolo 9: REGULAROJ	9
INTERNA REGULARO	10
Artikolo 2: DIFINOJ	10
Artikolo 4: ELDONAJHOJ	10
Artikolo 5: MEMBRECO	11
Fino de membreco	11
Artikolo 6: FINANCAJ RIMEDOJ	11
Artikolo 7: LA ORGANIZA STRUKTURO	12
La Komitato	12
Sekcioj kaj Rerezentantoj	15
Indekso de la Statuto kaj Interna Regularo	18

STATUTO

de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Aprobata dum la komitatkunsido de la 32a Konferenco, la 12an de aŭgusto 1998 en Montpellier, Francio.

Artikolo 1: IDENTECO

- 1.1 La nomo de la organizo estas "Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj"; mallonge "I.L.E.I."
- 1.2 En la sekva teksto de tiu ĉi Statuto ĝi estas nomita "la Ligo".

Artikolo 2: DIFINOJ

- 2.1 La Ligo estis fondita en la jaro 1949 por nelimitita tempo.
- 2.2 La Ligo estas faka organizo pri edukado kaj instruado.
- 2.3 La Ligo estas demokratia organizo, memstara en rilatoj kun aliaj organizoj kaj institucioj.
- 2.4 La bazaj principoj por la Ligo estas tiuj de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj la Universala Deklaracio de la Rajtoj de la Infano.
- 2.5 La Ligo havas sian sidejon en Nederlando, jure rekonita de la komerca ĉambro de la Haga Regiono, numero 27181064.
- 2.6 La oficiala lingvo de la Ligo estas la internacia lingvo Esperanto.

Artikolo 3: CELOJ

La celoj de la Ligo estas:

- 3.1 Edukado al estimo de la homo kaj al respekto al la vivo kaj al la naturo.
- 3.2 Progresigo de la interkomprenigo inter la popoloj.

Artikolo 4: TASKOJ POR ATINGI LA CELOJN

- 4.1 Unuigi geinstruistojn kaj geinstruantojn esperantistajn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en chiuspecajn lernejojn kaj por celtauga instruado de Esperanto.
- 4.2 Atenti, esplori kaj analizi pedagogiajn problemojn en la lingvo-instruado kaj labori por solvi ilin.
- 4.3 Iniciati, organizi kaj subteni sciencajn esplorojn pri la instruado de lingvoj.
- 4.4 Organizi intershanghojn de spertoj el la pedagogiaj scienco kaj praktikado por plibonigo kaj modernigo de la instruado de lingvoj, speciale de Esperanto.
- 4.5 Organizi diversspecajn internaciajn aranghojn cele al interkomprenigo pere de la internacia lingvo.
- 4.6 Organizi pedagogiajn konferencojn kaj laborkunvenojn.
- 4.7 Aranghi internaciajn ekzamenojn pri kapablo en apliko kaj instruado de Esperanto.
- 4.8 Kontakti kun registaraj kaj edukaj instancoj kaj kun aliaj organizajhoj kies celoj estas konformaj al tiuj de la Ligo.
- 4.9 Publikigi eldonajhojn kaj komunikajhojn.
- 4.10 Apliki aliajn leghe permesitajn rimedojn.

Artikolo 5: MEMBRECO

- 5.1 Chiu persono kiu rekonas la Statuton, okupighas au interesighas pri edukado kaj instruado, rajtas membrighi.
- 5.2 Membroj distingighas en sekciaj membroj kaj individuaj membroj.
- 5.3 Fino de membreco okazas pro:
 - 5.3.1 deziro de la membro;
 - 5.3.2 kontraustatuta ago de la membro;
 - 5.3.3 forpaso de la membro.
- 5.4 La membroj havas la rajton:
 - 5.4.1 cheesti chiujn kunsidojn de la Komitato;
 - 5.4.2 ricevi la regulan eldonajhon de la Ligo;
 - 5.4.3 starigi demandojn kaj doni konsilojn al la instancoj nomitaj en artikolo 7.

Artikolo 6: FINANCAJ RIMEDOJ

La financaj rimedoj de la Ligo estas:

- 6.1 membrokotizoj;
- 6.2 donacoj;
- 6.3 rentoj kaj heredajhoj;
- 6.4 aliaj enspezoj.

Artikolo 7: ORGANIZA STRUKTURO

La instancoj de la Ligo estas:

- 7.1 la Komitato;
- 7.2 la Estraro;
- 7.3 la sekcioj kaj la reprezentantoj.

La Komitato

- 7.1.1 estas la supera decida instanco de la Ligo;
- 7.1.2 konsistas el komitatanoj, kiuj estas skribe delegitaj membroj;
- 7.1.3 kunsidas minimume unufoje jare;
- 7.1.4 decidas pri akcepto kaj/au shangho de la Statuto kaj de la Interna Regularo;
- 7.1.5 rajtas nomi kandidatojn por la Estraro;
- 7.1.6 elektas la membrojn de la Estraro, el kiuj la prezidanton, la sekretarion kaj la estraranon pri financoj kiel funkciulojn;
- 7.1.7 elektas la membrojn de la Kontrola Komisiono pri Financoj;
- 7.1.8 starigas kaj nuligas laborkomisionojn;
- 7.1.9 pridiskutas kaj prijuhas la laboron faritan de la Estraro, de la sekcioj, de la reprezentantoj kaj de la komisionoj;
- 7.1.10 povas sensharghigi la Estraron;
- 7.1.11 decidas pri la sekvindaj gvidlinioj;
- 7.1.12 decidas pri akcepto au eksigo de sekcioj;
- 7.1.13 povas senrajtigi komitatanon pro kontraustatuta ago;
- 7.1.14 fiksas la membro-kotizon;
- 7.1.15 prijuhas la raportadon de la Kontrola Komisiono pri Financoj;
- 7.1.16 decidas pri oficoj plenumotaj de pagata oficisto;
- 7.1.17 decidas per simpla plimulto de validaj vochoj (escepte en la kazo nomita en 7.1.18), se minimume triono de la vochdonrajtaj komitatanoj cheestas au reprezentighas en la kunsido;
- 7.1.18 decidas per minimume tri kvaronoj de la validaj vochoj pri malfondo de la Ligo. Tiuokaze chiu

havajho de la Ligo estos donacita al Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando, au al samcela instituto, decidota de la Komitato.

La Estraro

- 7.2.1 gvidas la Ligon;
- 7.2.2 konsistas el minimume kvin kaj maksimume nau membroj kun trijara oficodauro inter kiuj prezidanto, sekretario, estrarano pri financoj, vicprezidanto kaj vicsekretario;
- 7.2.3 okazigas la elekton de komitatanoj nome de la individuaj membroj;
- 7.2.4 faras proponojn al la Komitato;
- 7.2.5 raportas kaj respondecas pri siaj agoj al la Komitato;
- 7.2.6 rajtas proponi kandidatojn por estraraneco;
- 7.2.7 rajtas okazigi skribajn voĉdonojn de la komitatanoj;
- 7.2.8 rajtas nomi kaj anstatauigi pagatajn oficistojn por oficoj fiksitaj de la Komitato lau artikolo 7.1.16;
- 7.2.9 rajtas inviti gastojn al siaj kunsidoj kaj al tiuj de la Komitato.

Sekcioj kaj Rerezentantoj

- 7.3.1 Sekcio agas en difinita teritorio.
- 7.3.2 Sekcio povas esti fondata de minimume kvin membroj en difinita teritorio.
- 7.3.3 Sekcio nomas sekcian estraron, el kiu unu kiel sekciestron.
- 7.3.4 Rerezentanto reprezentas la membrojn en teritorio sen sekcio.
- 7.3.5 Sekcioj kaj rerezentantoj nomas komitatanojn.

- 7.3.6 Sekcioj kaj reprezentantoj rajtas fari proponojn al la Komitato kaj rajtas nomi kandidatojn por la Estraro de la Ligo.
- 7.3.7 Ili respondecas al la Komitato pri chiuj siaj agoj koncerne la celojn de la Ligo.

Artikolo 8: LA ADMINISTRA JARO

- 8.1 La administra jaro egalas al la kalendara jaro.

Artikolo 9: REGULAROJ

- 9.1 Al tiu chi Statuto apartenas Interna Regularo, Elekto-regularo, Konferenca Regularo kaj eventualaj aliaj regularoj.

INTERNA REGULARO

de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Tiu chi regularo estas por interna uzado de la Ligo kaj celas kompletigi la Statuton.

La numerado de la artikoloj sekvas tiun de la Statuto. Se iu artikolo el la Statuto ne estas menciita en chi tiu regularo, ghi ne bezonas aldonon.

La Interna Regularo estas, post shanghighoj, aprobita en la komitatkunsido de la 32a ILEI-konferenco la 12an de agosto 1998 en Montpellier, Francio.

Artikolo 2: DIFINOJ

2.2 La Ligo estas alighinta faka asocio al Universala Esperanto-Asocio.

Artikolo 4: ELDONAJHOJ

- 4.9.1 La regula eldonajho de la Ligo nomighas "Internacia Pedagogia Revuo", mallonge "IPR". (Literatur-referenca mallongigo: Int.Pedag.Rev.)
IPR aperas minimume tri fojojn en la jaro.
- 4.9.2 La Ligo eldonas internacian Esperanto-revuon por lernejoj kaj komencantoj, Juna Amiko.
- 4.9.3 Pri aliaj eldonajhoj decidas la estraro.

Artikolo 5: MEMBRECO

- 5.1.1 Membreco validas por unu jaro kaj plilongighas per la sama periodo.
- 5.2.1 Membroj loĝantaj en teritorio kie estas sekcio, estas Sekciaj Membroj. Membroj loĝantaj en teritorio kie ne estas sekcio, estas Individuaj Membroj.
- 5.2.2 Chiu membro povas fariĝi Dumviva Membro pagante dudekoblan jarkotizon.
- 5.2.3 Honora Membro estas senpaga membro nomita surbaze de siaj meritoj por la Ligo au por la instruado de Esperanto.

Fino de membreco

- 5.3.1 Membro povas fini sian membrecon per skriba sciigo al la Ligo au al la Sekcio.
- 5.3.2.1 La Ligo au la Sekcio povas eksigi membron pro kontraŭstatuta ago. Ankaŭ unujara nepago de la kotizo estas kontraŭstatuta ago.
- 5.3.2.2 Kontraŭ la sub 5.4.1 nomita decido eblas apelacii che la Komitato ghis unu monato post la ricevo de la sciigo. Tiukaze la eksigo estas prokrastata ghis la decido de la Komitato.
- 5.3.3 Pri forpaso de membro la Ligo estu informita kiel eble plej baldaŭ.

Artikolo 6: FINANCAJ RIMEDOJ

- 6.1.1 La kotizo devas esti pagita antaŭ la unua de marto, de la sekciaj membroj al la sekcio, de la individuaj membroj al la Ligo.
- 6.3.1 Heredajhoj estas akceptataj sub kondiĉo de registrado de la inventaro.

Artikolo 7: LA ORGANIZA STRUKTURU

La Komitato

7.1.2 La Komitato konsistas el: Sekciaj Membroj kaj Individuaj Membroj, kiuj elektas komitatanojn laŭ la sekva tabelo:

membroj	5-14	15-34	35-49	50-99	100-
komitatanoj	1	2	3	4	5

Por chiu plia kvindeko da membroj unu plian komitatanon. Unu komitatano havas unu voĉon. Mandato de komitatano estas trijara. La komitatano kiu dum sia mandato cheestis neniu komitatkunsidon sen skriba klarigo pri tio aŭ ne respondas al leteroj direktitaj al la komitatanoj, ne estas reelektebla. En komitatkunsido cheestanta komitatano povas reprezenti alia(j)n komitatano(j)n de la sama sekcio aŭ teritorio kiu(j) ne povas cheesti, kondiĉe ke tiu(j) alia(j) komitatano(j) skribe permesas tiun reprezenton. La cheestanta komitatano tiam havas la voĉo(j)n de la ne-cheestanta(j) komitatano(j).

7.1.3 Se la prezidanto kaj la vic-prezidanto de la Ligo ne cheestas en komitat-kunsido, la Komitato elektas la kunsid-estron.

7.1.6 La elekto de estraranoj okazas skribe. Kandidatoj estas elektitaj ricevinte la simplan plimulton el la validaj voĉoj. Sindetenoj ne estas validaj voĉoj. En kazo de unu kandidato la kunsidestro rajtas proponi voĉdonon per levo de la manoj.

Eksighinta estrarano estas unufoje reelektebla, sed eblas pliaj fojoj se du trionoj la Komitato konsentas. En kazo de intertempa eksigho de estrarano la ceteraj estraranoj respondecas pri daurigo de ties laboro.

- 7.1.7 La Kontrola Komisiono pri Financoj konsistas el minimume du membroj kaj vicmembro; el la membroj chiujare unu eksighas kaj estas anstatauta de la vicmembro. Chiujare la Komitato elektas novan vicmembron.
- 7.1.8 Laborkomisiono estas starigata por difinitaj taskoj kaj tempodauro. Laborkomisiono konsistas el minimume tri membroj, el kiuj minimume unu estas komitatano. Laborkomisiono raportas al la estraro laŭ interkonsentita maniero. Pri financoj por laborkomisiono estu skriba interkonsento inter la laborkomisiono kaj la estraro.
- 7.1.9 Raporton de la prijuĝoj ricevas la estraro, la sekcioj kaj la komisionoj.
- 7.1.10 La Komitato sensharghigas la estraron pri la finita administra jaro, se la prijuĝo pri la laboro de la estraro estas pozitiva.
- 7.1.11 La gvidlinioj estas skribe fiksataj por minimume tri jaroj; intertempe ili povas esti adaptitaj.
- 7.1.12 La Komitato povas malakcepti sekcion, se ekzistas gravaj duboj pri la ekzistopovo de la sekcio, kaj povas eksigi sekcion en kazo de kontraŭstatuta ago aŭ neplenumo de sia organiza devo.
- 7.1.13 Ghi povas senrajtigi komitatanon, se la sekcio aŭ grupo de individuaj membroj, kiu delegis lin, agis kontraŭstatute.
- 7.1.14 Ghi fiksas la membrokotizon por unu jaro.

- 7.1.17 En kazo de egaleco de la validaj voĉoj rilate proponon pri aferoj, la propono estas malakceptita. La kunsidestro rajtas postuli duan voĉdonon, eventuale skriban. La membroj de la estraro havas voĉdonrajton, escepte de aferoj pri kiuj ili mem respondecas. En kazo de elekto de personoj validas la elekto-regularo.
- 7.1.18 En kazo de malfondo de la Ligo la temo devas esti anoncita minimume ses monatojn antaŭ la kunsido pritraktonta la temon.
- 7.2.1 La Estraro rajtas decidi pri ĉiuj aferoj inter du kunsidoj de la Komitato, atentante la gvidliniojn nomitajn sub 7.1.11. Escepte tiujn de prezidanto, sekretario kaj estrarano pri financoj la estraranoj dividi la funkciojn inter si.
- 7.2.2.1 La Prezidanto:
- kunvokas kaj prezidas la kunsidojn de la estraro kaj de la Komitato;
 - reprezentas la Ligon en eksteraj rilatoj;
 - respondecas al la Komitato pri ĉiuj agoj de la estraro;
 - havas la rajton sin anstataŭigi.
- 7.2.2.2 La sekretario faras la protokolojn de la estrarkunsidoj, tenas la kontakton kun la sekcioj, individuaj membroj kaj la komitatanoj, kompilas la estraran jarraporton kaj sendas la dokumentojn por la komitatkunsido al la komitatanoj.
- 7.2.2.3 La estrarano pri financoj registras ĉiujn en- kaj elspezojn de la Ligo, zorgas pri la enkasigo de la kotizoj, faras la finanĉan jarraporton kaj la bughe-
ton por la sekva jaro kaj sendas tiujn dokumentojn al la komitatanoj

- 7.2.2.4 La ceteraj membroj zorgas pri:
- la organiza stato de la Ligo;
 - entrepreno kaj ebla efektivigo de agoj kiuj povas servi al la celoj de la Ligo.
- 7.2.3 La prezidanto, la sekretario kaj la estrarano pri financoj eksighu en sinsekvaj jaroj. Sama sistemo validas pri la ceteraj estraranoj, eksighantaj unu-ghis-triope. Tamen vicprezidanto eksighas ne samtempe kun la prezidanto kaj vicsekretario ne samtempe kun la sekretario. *
- 7.2.4 La estraro sendas siajn kaj ricevitajn proponojn al la komitatanoj minimume tri monatojn antau la venonta kunsido.
- 7.2.5 La skribaj raportoj de la sekretario kaj de la estrarano pri financoj kaj la bughetero estas sendataj al la komitatanoj minimume tri monatojn antau la komitatkunsido.

Sekcioj kaj Rerezentantoj

- 7.3.1 Sekcioj agas en difinita teritorio, kiu estas priskribita interkonsente kun la estraro.
- 7.3.2 Sekcioj strebas al legha stato, dezirinda por plifaciligi kontaktojn kun registaraj instancoj.
- 7.3.3.1 Sekciestro devas esti membro de la Ligo almenau du jarojn antau la elekto-jaro kaj resti membro tra la tuta mandato.
- 7.3.3.2 La elekto de sekciestro estas sciigata al la Estraro de la Ligo, kiu konfirmas la mandaton de la sekciestro.
- 7.3.3.3 La sekciestro havas trijaran mandaton kaj estas reelektebla. Li reprezentas la Ligon en la koncerna teritorio.

- 7.3.3.4 La sekciestro respondecas pri la pago de la kotizo antaŭ la 31a de marto kaj samtempa sendo de la membrolisto al la sekretario kaj la estrarano pri financoj de la Ligo.
- 7.3.3.5 La sekciestro prizorgas la jaran statistikon pri la instruado de Esperanto en sia teritorio.
- 7.3.3.6 La sekciestro respondas al la cirkuleroj kaj al skriba voĉdonado maksimume 40 tagojn post ilia forsendo de la sekretario de la Ligo.
- 7.3.3.7 La sekciestro informas la sekretario de la Ligo pri la ŝanĝoj en la sekcia estraro.
- 7.3.3.8 La mandato de sekciestro finiĝas se tiu dum pli ol unu jaro ne sendis raporton pri la sekcia agado, daŭre ne plenumas taskojn en la sekcio aŭ ne zorgas pri la sekcia reprezentigo en komitatkunsido.
- 7.3.3.9 La Estraro povas proponi al la Komitato ĉesigi la mandaton de sekciestro.
- 7.3.4.1 Reprezentanto devas esti membro de la Ligo almenaŭ unu jaron antaŭ la elekto-jaro kaj resti membro tra la tuta mandato.
- 7.3.4.2 Reprezentanton nomas la Estraro.
- 7.3.4.3 Reprezentanto servas al la membroj kaj reprezentas la Ligon en sia teritorio kaj klopodas starigi sekcion.
- 7.3.4.4 Reprezentanto havas trijaran mandaton kaj estas reelektebla.
- 7.3.4.5 La mandato de reprezentanto finiĝas se starighis sekcio en la koncerna teritorio.
- 7.3.4.6 La reprezentanto prizorgas la jaran statistikon pri la instruado de Esperanto en sia teritorio.

- 7.3.4.7 La reprezentanto respondas al la cirkuleroj maksimume 40 tagojn post ilia forsendo de la sekretario de la Ligo.
- 7.3.4.8 La Estraro povas chesigi la mandaton de reprezentanto se tiu dum pli ol unu jaro ne sendis raporton pri sia agado au daure ne plenumas taskojn en sia teritorio.
- 7.3.4.9 Kontrau la chesigo la reprezentanto rajtas apelacii al la Komitato, kiu decidas.
- 7.3.5 Sekcioj kaj reprezentantoj nomas komitatanojn laŭ artikolo 7.1.2.
- 7.3.7 Sekcioj kaj reprezentantoj:
- okupiĝas pri varbado de membroj kaj de simpatiantoj-donacantoj;
 - respondecas pri la korespondado kun la sekretario de la Ligo;
 - raportas skribe al la sekretario, antaŭ la 31a de marto, pri siaj agoj kaj atingoj dum la pasinta jaro.

*

La komitato decidis nuntempe ne apliki ĉi tiun alineon de la regularo.

Indekso de la Statuto kaj Interna Regularo

Klaku pagh-numeron por salti al la koncerna alineo.

A

Administrajaro 9, 13
Akcepto de sekcioj 7, 13
Alighinta faka asocio de UEA 10
Anstatauiigo de komitatanoj 12
Apelacio al la komitato 17
Apelacio kontraŭ eksigo 11
Aprob-detaloj
 de Interna Regularo 10
 de Statuto 4
Aranghoj 5

B

Bazaj principoj 4
Bugheto 14, 15

C

Celoj 5
Celoj, taskoj por plenumi 5
Cheso de membreco 6

D

Daŭro de ekzisto 4
Decidorajtoj de Komitato 7
Deklaracio de la Homaj Rajtoj 4
Delegado de komitataj voĉoj 7
Demokrateco 4
Devoj
 de la Komitato 7
 de reprezentantoj 16

 de sekciestroj 16
Difino de la Ligo 4
Distribuo de raportoj 13
Donacoj 6
Dumviva Membro 11

E

Edukado 4, 5
Edukaj instancoj 5
Egaleco de voĉoj en voĉdono 14
Eksigho de estrarano 13
Eksighoj rotaciaj 15
Eksigo de membroj 11
Eksigo de sekcioj 7, 13
Eksteraj rilatoj 5, 14
Ekzamenoj 5
Ekzistodaŭro de la Ligo 4
Eldonaĵoj 6, 10
Elektado de komitatanoj 12
Elekto-regularo 9
Enkasigo de kotizoj 14
Enkonduko de Esperanto 5
Enspezoj 6
Esperanto 4
 atesto pri kapablo instrui 5
 enkonduko 5
Esplorado 5
Esplorado scienca 5
Estimo de la homo 5
Estrarano pri Financoj 7, 8, 14
Estrarano, eksigho de 13
Estrarelektoj 7
Estraro 6
 decido-raĵtoj 14
 disdivido de funkcioj 14
 komunikado de proponoj 15
 konsisto 8
 nomado de kandidatoj 7
 sensharghigo 7, 13
 taskoj de estraranoj 15

F

Faka asocio de UEA 10
Faka organizo 4
Fiksado de gvidlinioj 7
Fiksado de membro-kotizo 7
Financa jaro 9
Financado de laborkomisionoj 13
Financaj rimedoj 6
Financo
 elekto de estrarano pri 7
 Kontrola Komisiono 7
 membro-kotizo 7
Fino de membreco 6, 11
Fondo de sekcioj 8
Fondojaroj 4
Forpaso de membro 6, 11
Funkcioj de estraranoj 14

G

Gastoj en kunvenoj 8
Gvidlinioj 13, 14
Gvidlinioj, fiksado de 7

H

Hago 4, 7
Hereditajtoj 6, 11
Homa estimo 5
Homaj rajtoj 4
Honora Membro 11

I

Identeco 4
IEI 7
Individuaj membroj 6, 11
 reprezentigo de 8
Infanaj Rajtoj 4
Instancoj de la Ligo 6
Instruado 4

de Esperanto 5

de lingvoj 5

Modernigo de 5

statistiko pri 16

Interkomprenigo interpopola 5

Interkomprenigo pere de aranghoj 5

Interna Regularo 9

Interna Regularo, aprobo de 10

Internacia Pedagogia Revuo 10

Intershanghoj de spertoj 5

IPR 10

J

Jara statistiko 16

Jaro administra 9

Jaro de fondo 4

Jarraportoj 14

Jarraportoj de sekcioj 17

Juna amiko 10

Jura rekono 4

Jura sidejo 4

K

Kalendara jaro 9

Kandidatoj por estraro 7

Kapablo en E-instruado 5

Kategorioj de membreco 6

Komerca Chambro en Hago 4

Komitatanoj 7

 anstatauigo 12

 senrajtigo 7, 13

Komitatkunsidoj, ofteco 7

Komitato 6, 7

 apelacio al 17

 estrarelektoj 7

 konsistigo 12

 kunsidoj 6

 mandat-periodo 12

 prezidado 12

- ricevo de proponoj 15
- taskoj por oficisto 7
- voĉdonado 7
- Konferenca Regularo 9
- Konferencoj 5
- Konsistigo de laborkomisionoj 13
- Konsisto
 - de estraro 8
 - de la Komitato 12
- Kontaktoj kun registaroj 5
- Kontaktoj kun sekcioj 14
- Kontraŭstatuta ago 6, 7, 11
- Kontrola Komisiono pri Financoj 7, 13
- Kotizoj 14
 - de membreco 6, 13
 - nepagado 11
 - pagado 11
 - por dumviva membro 11
 - transigo 16
- Kriterioj por membreco 6
- Kunvenoj 5
 - de Komitato 6
 - gastoj en 8
 - kunvokado 14
- Kunvoko de kunvenoj 14
- Kvorumo komitata 7

L

- Laborkomisionoj 7, 13
- Landaj Sekcioj 8
- Laulegheco de rimedoj 5
- Legha stato de sekcioj 15
- Liga difino 4
- Liga identeco 4
- Liga lingvo 4
- Liga malfondo 7, 14
- Liga mallongigo 4
- Liga nomo 4

- Ligaj celoj 5
- Ligaj instancoj 6
- Ligaj membroj 6
- Ligaj regularoj 9
- Ligaj taskoj 5
- Limdato
 - por kotizpagado 11
 - por proponoj 15
 - por raportoj kaj bughetoj 15
 - por reago al cirkuleroj 16
 - por transigo de kotizoj 16
- Lingvo-instruado 5
- Lingvo oficiala 4

M

- Malfondo de la Ligo 7, 14
- Mallongigo de la Ligo 4
- Malnomado de oficistoj 8
- Membreco 6, 11
 - de reprezentantoj 16
 - fino de 6, 11
 - kriterioj por 6
 - postulo por sekciestro 15
- Membroj
 - de estraro 15
 - eksigo 11
 - forpaso de 11
 - kategorioj 6
 - kotizoj 6
 - rajtoj 6
- Membrokotizo 7, 13
- Membrolistoj de sekcioj 16
- Memstareco 4
- Minimuma
 - aperofteco por IPR 10
 - membronombro por sekcio 8
- Modernigo de lingva instruado 5
- Modifoj al Statuto 7
- Morto de membro 6, 11

N

Naturo, respekto al 5
Nederlando 4
Nepago de kotizoj 11
Nomado de oficistoj 8
Nombro de estraranoj 8
Nomo de la organizo 4
Nuligo de laborkomisionoj 7
Numero de oficiala registro 4

O

Oficdauro por estraranoj 8
Oficiala lingvo 4
Oficistoj
 de la ligo 7
 nomado kaj malnomado 8
Ofteco de komitatkunsidoj 7
Okazigo de konferencoj 5
Organiza strukturo 6
Organizado de aranghoj 5
Organoj de la ligo 6

P

Pedagogia scienco 5
Pedagogiaj konferencoj 5
Pedagogiaj problemoj 5
Popola interkomprenigo 5
Prezidado de komitat-kunsidoj 12
Prezidanto 7, 8, 14
Prijugho de estrara laboro 7
Prijugho de sekcia laboro 7
Principoj bazaj 4
Proponoj por komitato 15
Proporcioj membroj-komitatoj 12
Protokoloj 14

R

Rajtoj

de la Komitato 7
de membroj 6
de Sekcioj kaj Rerezentantoj 9
estraraj 14
homaj 4
infanaj 4
prezidantaj 14

Raportado 7, 17
Raportoj 15
Raportoj, distribuo 13
Reago al cirkuleroj 16
Registaraj kontaktoj 5, 15
Registro-numero 4
Regularo 7
Regularoj de la Ligo 9
Rekono de merito 11
Rekono de Statuto 6
Rentoj 6
Rerezentantoj 6, 8, 16
 mandato 16
 nomigo 16
 taskoj 17

Respekto al vivo kaj naturo 5
Respondecoj de Sekcioj 9
Rilatoj eksteraj 14
Rilatoj kun instancoj 5
Rimedoĵ financaj 6
Rimedoĵ por atingi celojn 5
Rotaciaj eksighoj 15

S

Scienca esplorado 5
Scienco de pedagogio 5
Sciigo de nova sekcio 15
Sekciaj estraroj 8, 16
Sekciaj membroj 6, 11
Sekcioj 8, 15
 informo pri nomigo 15
 mandat-finigho 16
 mandat-periodo 15

- Sekcioj 6, 8
- akcepto kaj eksigo 7
 - akcepto kaj rifuzo 13
 - eksigo 13
 - jarraportoj 17
 - konsento pri teritorio 15
 - kontaktoj kun estraro 14
 - membrolistoj 16
 - minimuma membronombro 8
 - respondecoj 9
 - starigo 16
 - taskoj 17
- Sekretario 7, 8, 14
- Senrajtigo de komitatoj 7, 13
- Sensekciaj teritorioj 8
- Sensharghigo de estraro 7, 13
- Shanghoj en sekciaj estraroj 16
- Sidejo 4
- Siglo de la Ligo 4
- Skriba anonco de eksigo 11
- Skriba raportado 17
- Skribaj voĉdonoj 8, 16
- Spertintershanghoj 5
- Starigo de laborkomisionoj 7
- Starigo de sekcioj 16
- Statistiko jara 16
- Statistiko pri instruado 16
- Statuto 7
- kontraustatuta ago 6, 11
- Statuto, rekono de 6
- Strukturo de la Ligo 6
- Supera instanco de la Ligo 7
- T**
- Taskoj
- de estraranoj 15
 - de sekcioj kaj reprezentantoj 17
 - de sekretario 14
 - por atingi celojn 5
 - por oficistoj 7
- Tempolimo por voĉdonoj 16
- Tempo-postulo por malfondo 14
- Teritorioj por sekcioj 8, 15
- Teritorioj sen sekcioj 8
- Transigo de komitataj lokoj 12
- U**
- Universala Deklaracio de
la Homaj Rajtoj 4
- la Rajtoj de la Infano 4
- Universala Esperanto-Asocio 10
- V**
- Vicprezidanto 8
- Vicsekretario 8
- Voĉdonado
- egaleco de voĉoj 14
- Voĉdonado en Komitato 7
- Voĉdono pri malfondo 7